

La Espero

1973-3 Svenska Esperantotidningen

Fondita en 1913

Ĉe guto malgranda...



En organisation av SEF:s storlek har alltid ekonomiska problem: den är för stor för att skötas bara på lediga stunder, och för liten för att vara ekonomiskt självförsörjande. Vi skulle behöva ha någon eller några anställda som skulle kunna planera och verkställa hela verksamheten, hjälpa klubbar, starta verksamhet där sådan inte finns o. s. v. Vi skulle behöva hjälp från samhällets sida — större organisationer får den.

Ändå sköts SEF på lediga stunder och är helt beroende av sina medlemmars avgifter. Med dessa avgifter skall man betala medlemstidningen, hyran för sekretariatet, cirkulär och annat som behövs. Räkningen går helt enkelt inte ihop. Tidningen har under de senaste åren kostat mer än vad SEF fick in i medlemsavgifter. Det är anledningen till att vi har varit tvungna att minska på sidantalet t. ex.

Hyran för sekretariatet har gått upp i år och kommer att gå upp nästa år igen. Det är något som vi inte kan påverka. Vi befinner oss dock inte i någon katastrofal situation. Vi kan fortsätta att minska på tidningen, om det blir nödvändigt; vi kan säga upp lokalen där sekretariatet är inhyst nu och klara oss på ett annat sätt.

Problemet är inte att överleva, problemet är att göra något utöver detta. Helt nyligen har en ny broschyr kommit ut ("Behövs det fler språk när det redan finns tretusen?"), den "gröna" broschyren ("Valet av inter-

nationellt språk är en fråga om jämlikhet") är snart slut och måste tryckas om. Till hösten planerar vi en informationskampanj till skolor. Bara den kommer att kosta minst 10 000 kronor. Den nya läroboken "Ek!" kommer SEF att finansiera — med hjälp av sina medlemmar. Har du, förresten, redan beställt de exemplar som du behöver?

Intresset för skolkampanjen är stort. Fler esperantister än vi hoppades på, är villiga att medarbeta i den. Och ännu har inte alla klubbar tagit ställning till kampanjen.

I syfte att finansiera skolkampanjen har styrelsen beslutat att starta en insamling. I detta nummer av La Espero ligger det ett inbetalningskort. Låt det inte förbli oanvänt! Vi föreslår tre alternativ till inbetalning: välj det alternativ som är möjligt för dig.

Vi i styrelsen lovar att göra vårt bästa och tackar alla bidragsgivare på förhand.

ESPERANTOFÖRBUNDET
Styrelsen

Niaj libroj meritas atenton

En sia artikolo en nro 2/1973 s-ano Stridell tuŝas gravan demandon. La librovendado kaj la eniĝo en la lokajn bibliotekojn estas du aferoj, kiuj ege gravas. Multe oni diskutis kaj skribis pri la problemoj sen atingi deziratan rezulton. En malgrandaj lokoj ĝi eble ne metas nin en tian dilemon kiel en pli grandaj urboj. Kaj el tio sekvas ke nia agado devas varii de loko al loko.

Ekzemple en Göteborg ne malofte okazis, ke telefonis interesitoj, demandante jen pri iu ajn lernolibro, jen pri certa librotitolo por distro aŭ festa donaco. Nur tre malofte la petinto ricevis kion li deziris. Trovi taŭgan ejon en la centro ĝis nun ne ebligis, kaj aliflanke la fakta ekzisto de libroperanto en fora perferio ne multe kontentigis.

Sekve neniu estas kontenta pri la ĝisnuna sistemo. La esperon ke la librovendejoj vendos komisie ankaŭ nian literaturon oni ja devis cedi. La nova prez-kaj vendsistemo tion malobligas. Sekve devas pludaŭri la malnova sistemo, precipe pri lernolibroj, insignoj k. s. kiuj devas esti troveblaj kie kaj kiam ili aktualas, ekz. en kursoj kaj kunvenoj. Por la cetera literaturo la librovendejoj iom post iom certe raciigos la vendadon pere de la nova mend sistemo rekte ĉe Förlagsföreningen.

La pruntado en lokaj bibliotekoj certe ludos pli grandan rolon, kompare al nia bezono kaj iniciatemo. Sed ne sufiĉas ĉirilate nur establi esperantan fakon. Ni devas ankaŭ laŭpove influi la pliriĉigon de variaj kaj aktualaj sortimentoj, kaj — ne malpli grave! — zorgi ke la frekvenco en la pruntado rezultas kontentigan statistikon. Ĉar, neniu ĉefbibliotekisto favoros nian literaturon nur por ĝojigi malriĉan eldonejon!

En Göteborg oni akceptas nin en

la bibliotekoj jam de 35 jaroj. Komence en ABF, poste Dicksonska kaj nun Stadsbiblioteket. Ne mankis aludoj ke la pruntada statistiko iom lamas dum la aliaj fremdlingvoj nur postulas kreskantan spacon. Sed ni nun antaŭvidas, ke baldaŭ venos okazo por plibonigi nian bibliotekan staton.

Antaŭ jardeko unu el la membroj, E. S. Nilsson, testamentis al la esperantistoj de Göteborg monsumon kun la klaŭzo ke la rentumo estu uzata por aĉeto de bona Esperanto-literaturo (Centralbibliotek).

La ekzakta sumo ne estas tute preta, sed provizore ni kalkulas kun 60 000—65 000 kr. La testamento dekretas, ke la sumo restos netuŝita ĝis ĝi respondos al 50 000 kr. laŭ reala valoro de 1955. De tiam ni rajtos uzi la rentumon por literaturo laŭ starigitaj kondiĉoj.

Sekve ni kalkulas je konstanta, ĉiujara subteno al la esp. literaturo de minimume 3 000 kr. Siaflanke tio garantias ke Göteborgs Stadsbibliotek post ne longa tempo havos bone provizitan esperantofakon, kio ankaŭ ebligas al ĝi pruntedoni ĉe okazo specialajn aŭ malfacile trov-eblajn verkojn ankaŭ al aliaj bibliotekoj okcidentsevedaj.

La funkcion de "Stiftelse för E. S. Nilssons idéella fond" estas konfidita al Esperanto-Alianco.

Erik Ekström

Redaktoro:

Ĉu La Espero estas gazeto farata "de elito por elito"? Ĉu ĝi havas tro altnivelan enhavon kaj tial ne prezentas iun interesan legaĵon al la granda plimulto de la legantaro? Ĉu eĉ la lingvo uzata estas tiel altnivela kaj komplikita ke granda parto de la legantaro — por ne paroli pri la komencantoj — nur malfacile komprenas ĝin?

Ŝajnas, ke multaj emas jese respondi al la supraj demandoj. Ni ja ricevis multajn sugestojn kaj kritikojn pri La Espero dum la lasta tempo, kaj la Suda distrikto eĉ dediĉis grandan parton de sia jarkunveno al diskutado pri nia gazeto (bedaŭrinde sen inviti la redaktoron). El iu sufiĉe granda urbo en alia parto de nia lando ni aŭdis, ke malnova aktivulo asertis, ke pluraj membroj rifuzas pagi la kotizon, ĉar ili ne trovas ion interesan en nia gazeto kaj do preferas ŝpari tiun grandan monsumon!

Nu, kiel ni jam pli frue diris, ni ne povas neglekti la kritikon, sed ni

devas serioze pripensi, en kia maniero ni faru la gazeton pli interesa. Ni ricevis multajn malsimilajn proponojn, sed oni povas distingi certajn dezirojn, kiuj ŝajnas esti komunaj por granda parto de la legantaro: oni volas havi malpli da altnivelaj literaturoj, malpli da poezio, malpli da recenzoj pri novaj libroj. Iuj ankaŭ plendas, ke ni havis dum la lastaj jaroj tro da materialo el Rumanio, Hungario, Bulgario. Anstataŭ oni volas havi pli da amuzaj anekdotoj kaj facila legaĵo, pli da raportoj pri la agado de la kluboj. Oni ankaŭ volas havi kolonon por demandoj kaj diskutoj, kaj oni akcentas, ke devas esti **veraj** diskutoj, en kiuj aŭdiĝas la voĉoj de pluraj personoj, ne nur tiuj de unu aŭ du. Kaj antaŭ ĉio oni volas havi "paĝon por komencantoj".

Nun ni apenaŭ povas kontentigi ĉiujn tiujn dezirojn, unuavice ĉar certe trovigas legantojn, kiuj havas tute alian guston. "Elito" aŭ ne, sed ankaŭ por ili La Espero devas prezenti ion interesan. Duavice redaktoro de esperantogazeto havas certajn respondecojn. Kiam temas pri la recenzoj, ekzemple, estas evidente al ĉiu prudenta esperantisto, ke ni devas apogi la eldonejojn. Sen literaturo mortos nia lingvo! Kaj ni opinias, ke estas la simpla devo de ĉiu klubgvidanto stimuli la anojn legi ne nur la recenzojn sed eĉ la librojn!

Rilate al troa materialo el certaj landoj ni devas klarigi, ke ĝuste el tiuj landoj ni ja ricevas publikigindajn kontribuojn. Se oni kredas, ke la redaktoro estas superŝtita de bonaj manuskriptoj el la tuta mondo, oni eraras, kaj oni same eraras, se oni kredas, ke la tempo de la redaktoro sufiĉas por skribi al diversaj aŭtoroj aŭ tradukantoj en "la okcidento" por — ĝenerale sen rezulto — peti pri manuskriptoj. Cetere, esperanto estas internacia lingvo: se novelo aŭ artikolo estas bona, ĉu gravas el kiu lando ĝi devenas?

Ĉi tie ni ne povas ne citi el la redakcia informo en la ĵus aperinta numero de Norda Prismo: "Pro la fakto, ke Tiberio Morariu iĝis ano de la redakcio, vi verŝajne vidos pli da sveda (kaj rumana) literaturo." Ili evidente ne timas la rumanan literaturon!

Tiu ĉi redaktora kolono bedaŭrinde fariĝis tro longa — ne estas la intenco, ke la redaktoro mem plenigu la multekostan spacon de niaj kolonoj. Sed ĉar ni ne povas aperigi ĉiun apartan leteron kiun ni ricevis aŭ redoni ĉiujn vidpunktojn, ni volis tamen prezenti la ĉefajn aferojn, ĉar estas nia intenco fari nian eblon por ŝanĝi la enhavon de La Espero tiel, ke ĝi pli konformiĝos al la gusto kaj deziroj de la plimulto de niaj legantoj. Se vi ne konsentas, bonvolu aŭdigi vian voĉon!

J. Blomberg



Ny lärobok.
Till hösten.
Beställ idag
till förmånspris.

Till Svenska Esperantoförbundet, Jungfrugatan 30, 114 44 Stockholm

- Jag beställer exemplar av läroboken "Ek!" till förmånspriset 20 kr per ex.
 Jag lämnar kronor i bidrag, så att ni ska kunna ge ut boken i en större upplaga.

Jag skickar pengarna till postgiro 66 41 50-0, Svenska Esperanto-förbundet, Informationskonto.

Namn

Adress

Ne diru "ne eblas"

Aldone al la artikolo en la antaŭa numero de La Espero pri la prelegoj de Justin Manani el Burundio ni ne povas ne prezenti al vi kelkajn pensojn kaj spertojn:

Estas necese substreki, ke nia movado nun — almenaŭ en nia lando — povas atingi la pli maturan junularon, prezentante la internacian lingvon en gimnazioj, fakaj lernejoj, altlernejoj kaj universitatoj. Ne diru, ke tio ne eblas! Ni spertis dum intensiva semajno sufiĉe multon por pruvi, ke eĉ facile tio estas aranĝebla.

Unue temas pri kunlaboro kun organizaĵo, kiu dank' al sia pozicio en la socio povas pretendi pri tempo, prelegejoj kaj honorario. La aŭspicioj de la Societo por UN — kiel montras la spertoj en Gotenburgo — senrezerve malfermas la pordojn, precipe se la prelegisto traktas temon en la kadro de UN. S-ro Minani enkonduke menciis la invitintan organizaĵon, substrekis la 25-jaran datrevenon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Poste li devis en sia prelego konstati, ke Homaj Rajtoj ne ekzistas por lia propra populgrupo, kvankam ĝi konsistigas 85% de la popolo de Burundio. Regas militista diktaturo.

Ni tiel provis novan metodon, prezentante la neŭtralan, internacian lingvon kiel elektita lingvo por prelego pri aliaj aktualaj temoj. La prelegisto kaj la interpretisto havas tre

malsimilajn gepatrajn lingvojn: ikirundi kaj la sveda. Enkonduke la prelegisto deklaris ke "ni elektis la internacian lingvon esperanto, kiu estas komuna por ni ambaŭ". Ĉie la aŭskultantoj tute memkompreneble kaj nature akceptis esperanton, kaj post la prelegoj multaj deziris informojn pri esperanto, pri kies praktika valoro ili ja mem konstatis!

Kial SEF — kaj alilandaj asocioj — ne sekvas la saman modelon? Tamen, tre gravas kunlaboro kun aliaj organizaĵoj. Per tiaj prelegaraĵoj ni ja prezentas esperanton kiel taŭgan **interlingvon**. Estas nia tasko prezenti ĝin tiel, ĉu ne?

Post similaj, tre ampleksaj prelegserioj, devas sekvi plua informado pri la internacia lingvo, devas sekvi ankaŭ instruado. Ĝis nun ni ne havis sufiĉajn rimedojn por tio. Havigu tiujn rimedojn, kara SEF-estraro! Havigu instruilojn, lernolibrojn kaj... lertajn geinstruistojn! Pripensu tiun novan linion, kiun ni cetere jam de longe rekomendis. Ĉu iu estas preta serioze diskuti planon, kiu povos signifi "novan printempon" por esperanto? **Iva kaj Lennart Åberg**

Sveda KELI dum 1972

Kristliga Esperantoförbundet — la sveda sekcio de la Kristana Esperantista Ligo Internacia KELI — aperigis sian jarraporton por 1972 kaj ni ĉerpas el ĝi la jenon:

La sekcio aranĝis esperantlingvan diservon en Västerås je la jarkon-

greso de SEF. — La jarkonferenco okazis en Lundsbrunn en Majo kaj oni dediĉis al ĝi kvar tagojn. 40-o da partoprenantoj. Bibliajn studojn pri la temo SOPIRO gvidis pastoro Rosbach el Norvegio, kiu ankaŭ gvidis publikan diservon en la misia preĝejo de Götene.

En oktobro denove kolektiĝis 40—50 membroj por tri-taga aŭtuna konferenco. Tiu okazis en la Misiista Altlernejo de Götaboro, Kumla, kaj unu vesperon oni dediĉis al la sveda apogo al la evolulandoj. La direktoro de SIDA — la oficiala sveda institucio por la evoluhelpo — Paul Rimmerfors ĉeestis kaj rakontis pri la laboro en la evolulandoj. Tiun kunvenon partoprenis ankaŭ la instruistoj kaj lernantoj de la Misiista Altlernejo.

La vojaĝsekretario Anna Alamo-Sandgren daŭre veturas tra la lando kaj parolas en kunvenoj de diversaj kristanaj organizaĵoj. Dum la jaro ŝi kolektis 7.500 aŭskultantojn je 180 prelegoj. S-ino Sandgren kutimas frutempe informi la lokajn esperantosocietojn pri sia vizito, tiel ebligante al iliaj anoj krei kontaktojn kun la aktivaj kristanoj.

La Esperanto-Misio, fondita antaŭ dudek jaroj de Karl-Olof Sandgren, kiu ankoraŭ gvidas ĝin, distribuis dum tiu tempo partojn de la Biblio kaj evangeliajn verkojn al centoj da landoj en ĉiuj kontinentoj. Dum 1972 ĝi distribuis 4.387 verkojn.

La eldonejo Verda Stelo kiu eldonis mil gramofondiskojn kun kantoj de Margit Håkansson-Frisell raportas, ke pli ol la duona nombro estas jam vendita. — La svedlingva presita "Medlemsblad" aperis trifoje kun entute 28 paĝoj, kaj ĉiuj membroj krome ricevas la organon de KELI, Dia Regno, kaj "Esperanto Nytt".

Pri la laboro de la diversaj grupoj ni notas, ke la stokholma grupo havis viziton de parlamentano Olle Dahmén, prezidanto de la Komisiono por internaciaj demandoj de la Tutmonda Konsilantaro de la Eklezioj. Li parolis pri la temo "La eklezioj en la krucfajro de la monda krizo" kaj oni transdonis skribaĵojn petante pri apogo al la klopodoj enkonduki la internacian lingvon en la agadon de la eklezioj, speciale inter la gejunularo.

En la sama numero de la membrofolio Ingvar Lagerström private pleadas por Esperantobieno — speciale por la gejunularo. Tiurilate li proponas kunlaboron kun la nova religia movado la Jesus-popolo, entuziasmaj gejunuloj kiuj evidente prezentas ion novan kaj sukcesas kapti la atenton de junaj homoj. Estas grave, skribas Lagerström, ke ni ne rezignas sed ĉiam provas novajn vojojn. Prez. de la sveda sekcio de KELI: Ingvar Lagerström, S:t Pauligatan 6, 1 tr., 416 60 Göteborg, 031-19 37 90.

- BELAJ TAGOJ - PLUVAJ TAGOJ -

Ĉiam agrable legi interesan libron

JAROJ SUR TERO (L. Sinha) bind. 18: 80, bros. 14: 10

MALSATA ŜTONO (R. Tagore) bind. 23: 55

ISLANDAJ PRAVOĈOJ bind. 11: 75, bros. 8: 85

KREDO, FLOROJ, DINAMITO bind. 11: 75, bros. 8: 85.

INTER SUDO KAJ NORDO (F. Szilágyi) bind. 11: 75

ŜIPESTRO RAKONTAS (F. Lundqvist) bind. 11: 75, bros. 8: 85

Aldonu "moms" 17,65 %

Eldona Societo Esperanto

Fack, 200 42 Malmö 7 - Postgiro 578-5

Bunta bukedo

N-ro 3/72 de Norda Prismo

Jen pliaj 60 paĝoj. Verda kalejdoskopo de originala k. tradukita literatur, prezentita proze k. poezie. Diversspecaj-diverstemaj, de malsama gusto. Se ni nur citus la titolojn de ĉiuj detaloj, ne plu restus loko por recenzo. Tial ni nur mencias tiujn, kiuj ŝajnas al ni la plej elstaraj.

Guste lokitaj fronten: tre interesa intervjuo de Reinhard Haupenthal kun Kálmán Kalocsay. Unika kontribuo al la literatura historio de nia lingvo. Kaj: Kelkaj pensoj pri la arto insulti en Esperanto. De Marjorie Boulton. Kiu eĉ eksplodan ekstremon sentan sukcesas bridi per intelektulina delikateco bon-humora.

El la artikolo de M. Pančev pri La libroj... ni citas la enkondukon: "Ili rakontas pri la pasinteco, kreas la nunon k. kondukas nin al la estonteco. Ili instruas sen puni nin kaj sen ri-proĉi nin. Bonaj libroj estas hodiaŭ tio, kio ili estis hieraŭ. Ili ne retiriĝas de ni en tagoj de zorgo k. malsukceso, ili akceptas nin ĉiam kun la sama amikeco. Bonaj libroj havas sennombrajn amikojn, inter kiuj estas ankaŭ ni, Esperantistoj. Ĉar por ni la libroj, precipe la Esperanta Libro, havas grandajn signifon kaj valoron. Ĝi el nenio kreis novan popolon, perfektan organizaĵon k. poten-can movadon — fakto senprecedenca en la homa historio."

Ni frandis fabelon pri "Fratoj kuniklo k. Vulpo" de Joel Chandler Harris, Esperantigita de Karl Pov. (Oĉjo Remus, maljuna nigrulo, iama sklavvo, rakontis ĝin iam al filo de bienestro en sudsuda Usono.)

Pri sortbatita rumanino, Maria Nikifor, rakontas Tudor Arghezi (trad. Eugenia Morariu). Kun kortuŝa kompato sekvas la aŭtoro la sorton de sia malriĉa heroino, kies mizeron pligas aresto pro falsa akuzo.

Elstara Esp. verkisto hungara, Szathmári en sia novelo "La barbaro" donas al ni profundan analizon psikan pri barbaraj militistoj kun glavo sangon soifanta kaj kapo sen cerbo. Majstre li dokumentas la hipokritecon de "patriota" hombuĉado.

Kolizion de generacioj spegulas Ralph A. Levin en "La kompatindaj Muzoj.":

*Terpsiĥore eliris jam de longe
De nunaj popoldancoj malgraciaj.
Ne sambe oni dancas nun, nek konge —
Nur modas tremegadoj subsimaj.*

*Potaĉo pelis for la belan vazon.
Poemo nun, sen ritmo — eĉ sen ritmo —
Kaj dramo ne plu havas temobazon.
Muziko? Nur bruego trans laŭtimo.*

*La pentroarto mortis antaŭ jaroj.
(Ne ploru pri elverŝo de oleoj!)
Forpasis ĉio de la artalaroj:
La Muzoj nur postrestas en muzeoj.*

"De gustibus non est disputandum." Verŝajne vi havas alian guston. Ĝuste pro tio vi verŝajne trovos aliajn partojn legindajn en "Norda Prismo". Mi ne malkovris plurajn kaŝitajn trezorojn en ĉi kajero. Pro ke vi mem traboru pliajn murojn en la literatura minejo de N. P. T. M.

Du lokaj organoj

MALMÖ

El Malmö venas regule al ni ĉiunmonate la kluba gazeto "La Folio"

(fondita jam en 1906), kiu rakontas pri la agado de tiu klubo, eble la plej vigla de Svedujo. En la aprila numero ni trovas, ke Gösta Ljunggren prelegis pri "Gambio, la suna paradizo", kaj tio verŝajne estis pli ol ordinara turista bildmontrado, ĉar krom montrante la belecon de la lando la preleganto informis ke "la mezaĝo de la viroj estas 35 jaroj kaj de la virinoj 34. Multaj infanoj mortas dum siaj unuaj jaroj. La vivkondicoj estas malbonaj, la loĝejoj primitivaj. Poligamio estas permesata, kelkaj viroj havas kvar edzinojn."


Alian interesan prelegon faris Elly kaj Olle Persson pri Leningrad, kaj la 5-an de majo oni havis viziton de redaktoro Giorgio Silber el Milano, kiu prelegis pri "La lingva situacio en Afriko". Je la kunveno la 9-an de majo oni decidis i. a. pri la programo kaj la kursoj dum la aŭtuno.

GÖTEBORG

Ankaŭ la esperantistoj de Gotenburgo havas sian kunligilon — la "letero" de Oskar Svantesson kiu nun nomigas MUNDO kaj ne nur pritraktas lokajn aferojn sed kelkfoje eĉ enhavas interesajn artikolojn kaj diskutojn. Ĝi cetere kutimas rapide informi pri kunvenoj kaj aranĝoj esperantistaj en tuta okcidenta Svedujo. Tiel ni ĉerpas el ĝi la unuan oficialan informon ke

Henry Rydberg, Skövde, kaj Lore Kegel, Pirna, DDR, geedziĝis la 4-an

Neniu volas instrui esperanton al mi...



Ĉu vi jam aligis vin kiel kunlaboranton por la lerneja kampanjo? Ĉu via klubo jam pridiskutis kiel kunlabori kaj kiel plani la agadon?

Multaj jam montris sian intereson, sed pliaj estas bonvenaj. Ju pli ni estas, des pli granda estos la rezulto. Relegu la artikolon en la antaŭa numero de La Espero kaj pripensu, ĉu vi povas fari ion.

de majo en Pirna. Ili renkontigis dank' al esperanto, do nova esperanta paro.

Ni gratulas sincere.

Brilaj, varmaj, koloroj



Valborg Caesar ĉe la teksilo.

Tre malnova estas la teksado, t. e. la ago "dense interkrucigi la fade-
nojn de vefto kaj de varpo, por el-
fari ŝtofon" (laŭ PIV), kaj tre frue
oni lernis krei artajn verkaĵojn per
teksado. Plej konataj al ni eble estas
la gobelinoj, murtapetoj, kiuj kon-
kuras kun la pentroarto. Gobelinoj
estis faritaj je ŝtata fabriko en Pa-
rizo, sed ni emas erare nomi tiel
ĉiujn malnovajn teksitajn tapetojn,
eĉ se ili devenas el epoko multe pli
frua ol tiu de la gobelinoj.

Jam dum frua Mezepoko oni uzis
teksitajn tapetojn kaj la arto plej
floris dum la 15-a jarcento, kiam oni
precipe en Francujo kaj Nederlando
kreis tapetojn de unika beleco.

Oni uzis la teksitajn tapetojn por
kovri la nudajn, malvarmajn ŝton-
murojn de la malnovaj kasteloj, kaj
en niaj tagoj, kiam oni denove ne
plu pentras aŭ kovras la murojn sed
— precipe en publikaj ejoj — lasas
la nudajn brikojn, tute konsekvence
kreskas la intereso por la teksarto.

La bildoj kaj koloroj de la mola ŝto-
fo mildigas la impreson de la nuda
ŝtono kaj kreas pli varman atmo-
feron ol pentraĵo.

Nia samideanino **Valborg Caesar**,
Torggatan 12, Skövde, estas konata
sveda tekstilartistino kiu speciale
okupiĝas pri la renovigita arto. Sia
plej nova granda verkaĵo estas mur-
ornamajo por la kuracista ĉambro de
la nova Centra Malsanulejo de Skara-
borg en Skövde. La sceneja kurteno
de la moderna teatro de Skövde kaj
tiu de la teatra salono de la Nord-
landa Popolaltlernejo en Kungälv es-
tas ambaŭ kreitaj de Valborg Caesar,
kaj en la fama sporta hotelo Billinge-
hus muro de unu el la restoracioj es-
tas kovrata de alia verkaĵo de ŝi,
t. n. "aplikacio" de diverskoloraj ŝto-
foj, tiel kunigitaj ke ili formas sim-

bolan bildon geologian-historian pri
la monto Billingen.

S-anino Caesar ne atingis sian nun-
nan pozicion sen multe da laboro kaj
obstina batalado kontraŭ diversaj
malfacilaĵoj. Ŝi studis dum kvar jar-
oj je la Arta Fakaltlernejo de Goten-
burgo (Konstfack) kaj poste ekster-
lande, en i. a. Britujo kaj Vieno.

Ŝi faras ne nur grandajn verkaĵojn
por publikaj ejoj sed ankaŭ pli mal-
grandajn, kiuj konvenas por la hej-
moj — kaj monujoj — de ordinaraj
homoj. Laŭ mia nefakula prijugo
ŝiajn lastatempajn verkaĵojn karak-
terizas brilaj, varmaj koloroj, ofte
kun iu arĝenta aldono, kiu donas kva-
zaŭ festan impreson. obo

Lasta dato por manuskriptoj
por la sekvonta numero de La
Espero: 1:a de julio 1973!

Mallonge

RADIO

En la kadro de la gejunula parto
de la 3-a radioprogramo (P3) mer-
kredon la 9-an de majo okazis in-
tervjuo kun s-ro Jan Strönné pri
Esperanto.

GASTO EL ITALUJO

En la fino de aprilo kaj komenco
de majo la redaktoro de revuo "Lite-
ratura Foiro" Giorgio Silfer, Milano,
faris fulmrapidan viziton en pluraj
nordaj landoj por prelegi antaŭ ita-
laj kulturaj asocioj. Samtempe li
kaptis la okazon viziti kelkajn E-
societojn. En Svedujo li elektis nur
du lokojn, Stockholm kaj Malmö,
kiuj ambaŭ deziris la temon "La ling-
va situacio en Afriko". S-ro Silfer
zorge klarigis la konfuzan situacion
en la tuta mondparto kaj substrekis
la nepran bezonon de Esperanto.

GRAVA REGISTRADO

La estraro de SEF deziras registri
tiujn esperantistojn en la lando, kiuj
estas kapablaj kaj bonvolaj gvidi es-
perantokursojn kaj studrondojn por,
unuavice, komencantoj en kaj prok-
sime de sia hejmloko.

La SEF-estraro petas al ĉiu klub-
estraro, al ĉiu unuopa esperantisto
energie kunhelpi je ĉi tiu tre grava
registrado. Ni petas, anoncu vin re-
kte aŭ pere de via klubestraro al NILS
G. JOHANSSON, KARLSHOVSVÄ-
GEN 48, 602 13 NORRKÖPING, tel.
011-16 69 33, kiu promesis perlabori
la materialon kaj poste ĝin trans-
doni al la estraro de SEF.

IOM EL SKÖVDE:

En Skövde daŭre viglas aktiveco.
Alĝo de novuloj lastatempe ne estis
tute kontentiga, sed tamen la agemo
estas fresé energia. La klubo nom-
bras nun 53 anojn. La nova estraro
bone startis. Ĉijare 9 klubanoj trapas-
sis la elementan ekzamenon. La espe-
ro pri nova, pli granda klubejo pro-
mesas pli favoran eblecon por la
proksima estonto. Kun bonkvalita
programo la aktuala klubsezono kon-
tinuis ĝis fino de Majo. 11.5 kolek-
tiĝo kun speciala programo por in-
vitita, juna publiko.

Cc

Klubgvidantoj!

Bonvolu sendi al ni raportojn pri la
agado de via klubo. Pri kursoj kaj
kunvenoj, pri vizitoj kaj ekskursoj!
Raportu mallonge pri ĉefaj aferoj.

Red.

Förlagets årsrapport

Tryckning av ny upplaga av Svensk-Esperantisk ordbok beräknas kunna ske under hösten 1973. På grund av de höga kostnader, som för närvarande råder för bokframställning, kommer den befintliga ordboken att omtryckas, kompletteras med ett supplement som för närvarande utarbetas av Ebbe Vilborg.

För att hålla nere förlusterna på grund av kursfluktuationer och uteblivna betalningar har åtgärder vidtagits för att påskynda likviderna till och från leverantörer och kunder. Som framgår av balansen har detta i huvudsak lyckats, men det kan nämnas, att under året kr. 936:— förlorats på grund av bokhandelskonkurser.

Omsättningen har uppgått till kr. 23 177:—, vilket utgör en minskning.

Enär vinsten är för liten att medge utdelning, föreslår styrelsen att den föres i ny räkning.

Förlagets expedition har under

året förestått av fru Anna-Greta Strömne.

Styrelsen har under året hållit två protokollförda sammanträden. Styrelsen har bestått av Hjalmar Andersson, Gertrud Lund, Sven Sjöblom, Karin Strandberg och Per Törnegrén med Sven Sjöblom som ordförande. Styrelsesuppleanter har varit Bertil Nilsson och Nils Olsson. I tur att avgå är Sven Sjöblom, Karin Strandberg och Bertil Nilsson.

Ni lernu per la eraroj

"Mi skribis vin leteron" estas erara esprimo.

Ni provu trovi la eraron per demandoj: KIU? respondo: Mi. KION FARIS? respondo: skribis. AL KIU? respondo al vi. KION, respondo: leteron. Do la ĝusta frazo estas: "MI SKRIBIS AL VI LETERON" "al kiu?" demandas kaj "al vi respondas". Ĉi tie temas pri la gramatika kazo **DATIVO**. (La objekto de la skribo estis la letero, do tie oni ĝus-

te uzis la finaĵon "n". Tie temis pri AKUZATIVO.)

★

(Merkrede) neniun kunveno en la kluboj. Anstataŭ (?) ni iros al la Urba Muzeo (?) por viziti la ekspozicion de la Esperantistaj Blinduloj." "Mus-eo" similas al "mus-ejo" t. e. loko kun aro da musoj (musoj estas la "bifsteko" de la katoj). La esprimo Muzeo parencas al Muz-ejo (loko por la Muzoj? "Muzoj" en la greka mitologio estis la diinoj de l'arto ktp. kiuj inspiris la poetojn ktp. La komencajn du frazojn mi preferu esprimus per unu: "ANSTATAŬ VIZITI LA MERKREDAN KLUBKUNVENON, NI VIZITOS LA EKSPOZICION DE LA ESPERANTISTAJ BLINDULOJ EN LA URBA MUZEO." T. M.

La ŝtormo

En neĝa, tempesta, novembro tago mia patrino naskis min. Ŝi naskis min en eta montara vilaĝo, kie la vento furiozas kaj la riveroj impete sin jettas malsupren.

Jam kiel infano mi paŝtis kaprojn sur la montaraj herbejoj, dormis sur la tero en plena aero sub la tremanta steloplana ĉielo kaj vekigis rosokovrita de la matena roso. Kaj se mi estis soifanta, mi suĉis varman lakton rekte el la mamoj de la kaprinoj. Ofte la pluvo banis min, poste la suno sekigis miajn vestojn. Ofte la sovaĝaj

Efter första kursen läser
man på egen hand

EL LA VIVO DE L. L. ZAMENHOF

Lätilläst och livfull skildring av Zamenhofs ungdom.

Kostar endast 3:25 med moms.

VIVO VOKAS

En bok om ungdom av Stellan Engholm. Klar, enkel stil.

11:75 med moms (inbunden)

MI SERĈIS ORON ...

Äventyrsroman av David Flood. Handlar om oljeletande och guld-sökning i Amerika.

Häftad 8:80, inb. 11:75 med moms.

Beställ i dag hos

ESPERANTOFORLAGET

Fack, 200 42 Malmö 7

BALANSRÄKNING

Tillgångar:	1972-01-01	1972-12-31
Omsättningstillgångar		
Kassa	0	0
Postgiro	4.752:66	3.773:20
Bank	39.672:32	41.691:80
Kundfordringar	5.789:64	1.503:82
Varulager	10.165:80	8.017:65
Kommissionslager	753:92	269:40
Anläggningstillgångar		
Andelar i HSB	1.495:70	1.495:70
Inventarier	0	0
Summa	62.630:04	56.751:57
Skulder och eget kapital		
Skulder		
Långfristiga skulder	6.278:—	6.285:—
Diverse leverantörer	15.562:09	9.220:10
Skatter och avgifter	450:10	686:—
Eget kapital		
Andelskapital	32.740:—	32.740:—
Reservfond	6.509:60	6.509:60
Balanserad vinst	440:99	1.090:25
Årets resultat	+649:26	1.090:25 +220:62
Summa	62.630:04	56.751:57

VINST- OCH FÖRLUSTRÄKNING FÖR ÅR 1972

Intäkter:		Kostnader:	
Bruttovinst	11.072:96	Omkostnader	12.739:03
Ränteintäkter	1.886:69	Årets vinst	220:62
Summa	12.959:65	Summa	12.959:65

Malmö den 15 mars 1973.

Sven Sjöblom

Hjalmar Andersson Gertrud Lund Karin Strandberg Per Törnegrén

fruktoj estis mia nutraĵo. Tie, en la sino de la montaro, la naturo instruis al mi sian krudan kaj harmonian vivon. Pro tio mi amas ĝin, mi amas en ĝi tion, kio konsternas, humiligas, mi amas ĝiajn uraganajn fortojn.

Kaj vi, geamikoj, ĉu vi vidis ian ŝtormon en la montaro? Ne! Tiam, sendube, vi ne scias kiel la arbaro bruegas, kiel miloj da arbosuproj skuigas pro la vento samkiel la marondoj, samkiel la spikoj de la ondigita grenkampo. La ŝtormo rompas branĉojn, disverŝas riverakvojn, mal-suprentrenas gruzojn miksitajn kun koto kaj akvo kaj kantas iun poten- can kanton. Kvazaŭ grandega orkestro radias mirindajn sonojn, kiuj kun- fanditaj en simfonio, ŝvebas en la at- mosfero. La birdoj kaŝas sin en la ar- bokavoj, la bestoj — en siaj bestku- ŝejoj, nur la fulmotondroj fulmas zig- zage kaj tondras obtuze kaj la pluvo sagas per milionoj da sagoj.

En similaj minutoj mi, rifuĝinta en la enirejo de iu groto triumfas. Iu ne- ordinara sento obsedas min admiran- te la naturpotencon. Kaŝita inter la rokoj mi sentas kiel en mi vekigas la prahomo. La prahomo, kiu ne pose- dis la nuntempan pafarmilon kaj la bombojn. La prahomo kun la primi- tiva kaj pura animo. Li saltis de arbo al arbo per lianaj branĉokordo, ob- stine kuris post la ĉasaĵo, plongis en la lagojn por kapti fiŝojn por nutraĵo. Kaj mi demandas min ĉu de tiu ĉi praavo ne estas restinta en mi iu pri- mitiva instinkto por batalo kaj mem- konservado?

Mi amas vian multvariecon, ho ŝtormo!

Mi amas la ondigitan maron kaj la neĝajn turnoventojn, kiuj kirlas la falantan neĝon simile al funeloj kaj levas ĝin supren, supren al la ĉielo. La branĉoj de la larĝfoliaj arboj fleksi- ĝas, sed la piceoj staras potencaj kaj neŝanceleblaj, fieraj kaj sentimaj. Mi atente aŭskultas la tondradon de la falantaj lavangoj en la alta montaro kaj tiu ĉi tondrado igas min tremi pro plezuro kaj ĝuo. Mia vizaĝo kaj ore- loj ruĝiĝas pro malvarmo kaj vento, sed mi marŝas en la neĝa ŝtormo

trankvile kaj ĝoje, kaj pensas pri tiuj, kiuj en pli danĝeraj ŝtormoj transiris la nordpolusan cirklon kaj konkeris la arktikon.

Mi amas la fortajn travivaĵojn ĉar ili skuas min profunde kaj mi kom- prenas kial estas kreitaj la sentoj, la animo, la emocioj. La naturo donis al mi animon kaj ĝi devas soni kiel mu- zikkordo. La naturo donis al mi koron kaj ĝi devas flami kaj forflami en ĝojoj kaj malĝojoj.

Jen pro tio mi amas la homan ŝtor- mon nomitan: impeto, inspiro, revo, kuraĝo, kuraĝego. Tiu ĉi ŝtormo do- nas flugilojn al la homa spirito por ke ĝi saltu en la ĉielon, traboru la teran kruston, atingu la marprofundon kaj per primitiva flosa trapasu la ocean- non.

Jen pro tio mi malamas la trankvi- lecon, la monotonecon kaj la indife- rentecon.

Kaj pro tio mi diras al vi, geami- koj: ne revu, ke via vivo estu ĉiam senvaria, ĉiam senzorga kaj trankvi- la kiel malrapide trenanta sin akvo. La trankvila akvo ŝimiĝas, la trank- vila animo rapide atingas la morton. La rivero, la serpente fleksanta rive- ro kun multaj akvofaloj estas prefe- rinda kiel simbolo de la vivo, ĉar nur tiam vi eksentos, ke vi vivis kaj lasis spuron post vi. *Mihail Ŝekerĝiev*

Luksa revuo

Tre luksa esperantorevuo atingis nin el la Germana Demokrata Respu- bliko. Ĝi nomiĝas "Junularo", am- pleksas 64 paĝojn kun multaj bildoj

kaj luksan modernan, koloran kov- rilon.

Ĝi celas montri kiel vivas la geju- nuloj en GDR kaj aperas en espe- ranto okaze de la Monda Festivalo de la Junularo en Berlin (orienta) 1973.

La plej multaj artikoloj ja estas propagandaj (enkondukas proklamo de sekretario de CK, Erich Honecker) sed ankaŭ ili donas interesajn infor- mojn. Vere interesa estas la artikolo "Ni nin ŝatas — ĉu tion niaj gepatroj ŝatas?" kiu traktas pri la ri- latoj inter la gejunuloj mem kaj in- ter ili kaj iliaj gepatroj. De tiu ni lernas, ke la pli granda libereco de la gejunuloj en niaj tagoj, ankaŭ tie ne ĉiam estas senkondiĉe akceptita de la gepatroj sed ke la novaj kuti- moj — longaj haroj ktp. — ĉie ne- rezisteble enpenetras la socion. El- donejo: Verlag Zeit im Bild, Dres- den. **obo**

RES

till världskongressen i
BELGRAD
till ATEN eller SPLIT
med

den Skandinaviska kongressen. Anmäl Eder till kongressen (obs. före den 20 JUNI) och Ni får auto- matiskt resemeddelandet.

Kan även erhållas på be- gäran hos Jan Strönne, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö.

Konstrui per

YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

YTONGBOLAGEN

Hällabrottet

Ridu, reridu

— Amiko, mia filo, estas persono, kiu bone konas onin sed tamen sentas amon al oni.

★

Por esti feliĉa kun viro, estas necese kompreni lin multe kaj ami lin malmulte; por esti feliĉa kun virino, estas necese ami ŝin multe kaj ne klopori ŝin kompreni.

★

Virino ekmiras pri kio viro povas forgesi — viro pri kio virino povas memori.

★

Kio estas la diferenco inter singardo kaj malkuraĝo?

Se oni mem timas, tio estas sin-

VJETNAMA ESPERANTO- LITERATURO

Jenaj libroj esperantlingvaj aĉetebblaj ĉe ni:

KUN ONKLO HO (rakontoj, 400 p.)	6:—
RESUMO PRI VJETNAMIO (historio, 130 p.)	4:—
SKIZOJ PRI LA USONA NOVKOLONIISMO parto I 230 p., parto II 200 p. prezo ambau	8:—
GENERALA INSTRUADO EN VDR, 144 p.	2:—
NEFORGESEBLAJ TAGOJ de generalo Giap	4:—
LA TRADICIA VJETNAMIO historiaj etapoj, 170 p.	4:—
PREZIDANTO HO ĈI MINH biografio, 150 p.	4:—
HON DAT romano de Anh. Dag, 445 p.	6:—
NACIA FRONTO DE LIBE- RIGO DE SUD-VJETNAM	2:—
LA SOVAGA KOKINO laosaj noveloj, 130 p.	3:—
LA NACIAJ MALPLIMUL- TOJ EN V. D. R., 115 p.	3:—

Mendu ĉe nia adreso kaj pagu al nia poŝtgirokonto no 44 24 78-4

SVEDA M. E. M.-SEKCIO
Rinnansgatan 13, 660 92 DEJE

gardo, sed se aliaj timas, tio estas malkuraĝo.

Ĉe la komenco de la nuna jarcento
— Panjo, rigardu al tiu masonisto, kiu portas brikojn. Unue li uzis la fingrojn kiel naztukon, kaj poste li prenis brikojn per la sama mano.

La grafino: — Jes, kaj poste oni devas loĝi en tiaj domoj. Estas ja abomeninde.

(Albert Engström en Strix 1900)

— Sur mian tablon neniam venas guto da alkoholo.

— Ne, oni devas ŝpari la gutojn nuntempe. Ankaŭ mi estas singarda kiam mi enverŝas.

KION HELPAS TIO

se oni havas tigron en la tanko kaj 200 ĉevalojn sub la kapoto, sed ĉe la direktilo sidas bubalo.

BLANKEDA SVEDLANDO

— Bonvolu doni al mi blankedon! Mi intencas raporti pri ekbrulego.

Duoble Jim

PARDONU

*Pardonu min
intencis mi
neniun vundi,
nek Vin nek Ŝin.*

*Havu dankon Vi
pro fiera, serioza
komentaro — spegulo.*

*Mian bildon vidis mi
kaj hontas,
sentas min malpura.*

*Juĝo Via
severa sed justa,
bato eduka.*

TURMENTEĜO

*Mian koron
pikas dornoj akraj,
dornoj turmentigaj
de sinriproĉo.*

*Semis mi
en Vian koron noblan
trudherban ĝermon
de la dubo.*

*Tiel agu mi
ke formortos ĝi
por ĉiam.
Se montriĝos ĝi
nemortigebla
ne volas vivi mi.*

Jim Hornö

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack,
200 42 Malmö 7

Ejo: Möllervångsgatan 20 B

★

Dejortempo 1 sept.—15 majo:

merkredo 10.00—11.00

ĵaŭde 17.00—18.00

Skribaj mendoj ekspedataj dum la tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Poŝtgiro 578-5.

★

Administranto: Anna-Greta Strönné

Tel. hejma 040 / 12 92 11

Prez. Sven Sjöblom

Korespondu!

Edzino 35-jara. Hobioj: poŝtmarkoj, bildkartoj, pupoj en nacia kostumo, vojaĝoj.

S-ino Cobi Vooren, Canaverakte 21, Krommenie, Nederlando.

La Espero

Svenska Esperantotidningen

Organ för Sv. Esperantoförbundet,
Jungfrugatan 30, 114 44 Stockholm.
Postgirokonto 20 12-3.

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Redaktör: Åke Blomberg, Lottkällsgatan 2, 531 00 Lidköping.

Tel. 0510-235 26 (arb. 0510-221 30).

Medlemsavgift för direkt medl. 25 kr, ungdom 10 kr, familjemedlem utan tidning 5 kr.

Prenumerationspris 20 kr.

Förbundets sekretariat är öppet
onsdagar kl. 18—20, tel. 08-62 58 76.

Sturetryckeriet AB - Stockholm 1973